



MONATA BULTENO de la Esperanto-Societo "FRATECO"

INICIATINTO: S-RO IZIDORO FLORÍA

DIREKTORO: RAMÓN DE SALAS

Administracio kaj Redakcio: Str. RODA, 14-16

R  
I  
Z  
K  
U  
L  
T  
U  
R  
O



E  
N  
A  
R  
A  
G  
O  
N  
O

*Rizfalêado*

(Daŭrigo)

Per zorga elekto de rizrasoj, kies rapida maturiĝo, nepre necesa eco por la provo, kuniĝas kun bona grajnokvalito, kaj transplantante la rizon el ĝermogardenoj en la sensaligatajn kampojn, ĉar tio ĉi estis la nura rimedo por eviti malfruajn frostojn oftajn en la provinco Huesca, oni venkis la unuajn malfacilaĵojn kaj la koncernaj laboroj estis komencataj.

Rezultatoj?

La jenaj fotografajoj respondas tre bone ĉi tiun demandon.

La laboristoj de la regiono plenumis sian rolon plej kontentige: Tute facile kvazaŭ de antaŭpratempe ili kutimis realigi malsekigajn laborojn, kiaj tiuj de rizkulturado, ili eniris en la inunditajn kampojn kaj tre lerte faris ĉion, kion oni komisiis al ili, kaj fine por premii ilian klopodadon kaj tiun de la teknikuloj gvidintaj ilin, oni havis bonegajn rizkampojn kun densaj kaj grajnoriĉaj spikoj tre bo-

ne maturiĝintaj tie, kie antaŭe nur trovis vojaĝanto salajn efloreskojn, kiuj blankigis la teron same, kiel neĝo ĝin blankigas, kaj malprosperan kreskajaron el halacoj, kies grizverdaj nuancoj nur taŭgis por igi malgajaspekta la pejzaĝon.

Laŭ teknika vidpunkto ankaŭ la rezultatoj atingitaj estas ja kontentigaj: La akvokvanto bezonata por ĉiu hektaro estas proksimume egala al tiu postulata de la inunda procedo por sensaligi terojn: la sulfato de amonio, tiom multe uzata por pliriĉigi la grundon okaze de rizkulturado, multe efikas por trapenetrebliigi argilojn, kies nepenetrebeco estas eĉ pli granda pro la saloj de la grundo, kaj krom profitodona rizrikoltoj, dum oni sensaligas la kampon, ĝi liveras tiun ĉi tute preta por kulturoj propraj al la regiono, kio estas finfine la atingota celo, se oni ne volas pligravigi la ekonomian krizon de rizkulturo en la tuta mondo.

El revuo "Aragón"  
tradukis  
RAMÓN DE SALAS.

## MATENO EN ARBARO

Tiun tagon mi frue vekigis, kaj estis ankaŭ tre frue, kiam en arbaron mi venis. La birdoj kaj ceteraj bestetoj ankoraŭ dormis.

Mi vagadis en la lastaj, noktaj ombroj. La grandegaj arboj aspektis, kiel teruraj gigantoj gardantaj la profundan silenton de la nokto jam baldaŭ mortonta.

Komencis fali roso. Miaj piedoj eksentis la malvarmeton de la malsekaj herboj kaj floroj. Post kelkaj momentoj kvazaŭ stranga nebulo min ĉirkaŭis. La steloj jam ne estis tiom klare videblaj, kiel antaŭe. Tio pensigis min, ke baldaŭ estos naskiganta la nova tago.

Mi sidiĝis sur ŝtonon kaj ĝuis la belan someran ektagiĝon.

Ĉio estis silenta. Tiam mi memoris la rakontojn de ni legitajn en niaj infanaj jaroj. Mia revema spirito estus ĝuante nedifineblan feliĉon, vidante legendajn malgrandulojn per ruĝaj, krepaj vestoj kovritajn danci inter arboj kaj floroj kaj kanti mirindajn kantatojn naive dediĉitajn al ĉarma kaj bonkora feino...

Kaj poste, kiam la suno komencus origi la naturan mondon, ili, tute lacaj, rapide kurante forirus sin kaŝi sub la herbojn por tie ripozadi.

Tiam estus veninta la momento, kiam mi devus froti miajn mirigitajn okulojn kaj demandi min mem, ĉu la ĵus okazinta belega spektaklo nur realiĝis en la teatro de nia freneza fantazio.

Dum nia infanaĝo ni songas bele, sed poste la kurado de la jaroj nin vekas el tiuj songoj, kiuj ŝanĝiĝas en teruran kaj dolorigan realon. Ni tiam nepre devas rigardi la ĉiutagan vivon: ĉio estas unuforma, rigida malvarmesprima; ĉie oni vidas nur moviĝantajn aŭtomatojn, sed ne liberan konsciencon kun sindonaj, romantikaj pensoj. Eble tiu kruela realo devenas el niaj propraj malbonaj agoj.

Riveroj, arbaroj, montoj... Mi amas vin!

Post tiu ĉi pripensado la suno eklumigis la suprajn branĉojn de la plej altaj arboj. La birdetoj levis siajn kapojn el sub la flugiloj kaj gaje ekkantis. La floroj dissendis ĉien siajn parfumojn. Grandaj belaj papilioj ekflirtis ŝvebante per trembrilaj flugiloj de floro al floro. La abeloj zumadis.

La arbaro vekigis...

JAN-MELISSE.

*En la arbaro de la najtingaloj.*

## LA HISPANAJ LUDBATALOJ

Mi legis la faman verkon "Sango kaj Sablo" de la hispana beletristikisto Blasco Ibáñez, kiu estis unu el la plej lertaj pentristoj per la plumo.

La pentraĵoj, tiel majstre verkitaj de la aŭtoro en Sango kaj Sablo, estis tre saĝe, trafefe, tradukitaj en nian ligvon de S-ro Salas.

Mi nescias, kiom mi pli multe envidas: ĉu la artecon de la aŭtoro, ĉu la profundan konon pri Esperanto de la tradukinto.

Legante ĝiajn paĝojn, la leganto sin transportas al la medio priskribata; li vivas en ĝi.

Pasis jam troaj jaroj, de kiam mi vidis Sevillajn procesiojn de Sankta Semajno. Tiom da vereco mi trovis, legante la verkon, ke mi min sentis juna kiel tiam, sen zorgoj, sen ĉagrenoj, nur vivanta tiujn feliĉajn tagojn sub la hela, andaluzia suno.

Banditon, kiel tiu "Plumeto" de la verko, mi konfesas, ke neniam mi vidis; sed mi konfesas ankaŭ, ke mi vidas kaj konas nunajn banditojn multe pli danĝerajn kaj multege malpli kuraĝajn, ol li. Tiuj, kiuj sin prezentas, kiel amikoj, kaj vundas nin pere de la amikeco, kiun ni konfide liveris al ili.

Tiujn banditojn oni ĉiulande renkontas; eĉ en Esperantujo. Sed ni lasu tion.

Plej granda parto de la verko estas dediĉata al la priskribo de la hispana taŭrspektaklo, kiun la eksterlandanoj vizitantaj Hispanujon deziregas vidi, kaj kiun poste ili eble mallaŭdas, dirante, ke ĝi nur estas sovaĝaĵo.

Ankaŭ estas multaj hispanoj, kiuj samopinias: La taŭrajn ludbatalojn oni devus malpermesi.

Mi sciigas, ke mi vidis nur malmultajn el tiuj spektakloj. Eble pasis jam ses aŭ ok jaroj de la lasta fojo, kiam mi estis en taŭra cirko. Tio signifas, ke, se iu Ministro iutage malpermesos tiujn batalojn, mi restos tiel trankvila, kiel nun. Sed mi antaŭsciigas, ke, kiam mi estos Ministro, mi ne malpermesos ilin.

Oni diris al mi, ke nuntempe la ĉevalaĉoj surportas kvazaŭ antaŭtukon. Tiel multaj ĉevaloj jam ne plu mortas pro ventraj fendoj kaŭzitaj de taŭrkorno. Tiu antaŭtuko ne multe plaĉas al la surrajdantaj pikistoj tial, ke la interpuŝo je ĉevalo kaj taŭro estas tiel pli kruda kaj la pikrajdisto flugas teren, elpruvante la malmolecon de sia kapo... Tiu defalo estas tre interesa kaj pli humana, ol la morto de ĉevalaĉo kiu ne plu povas fieri pensante, ke ĝi estas utila eĉ per sia morto. Multaj homoj ne utilas eĉ por manĝi.

Ankaŭ oni diris al mi, ke nuntempe la toreadoroj ne havas la klasikan voston, kiun antaŭe ili lasis kreski sur sia verto: cent aŭ cent kvindek haroj pli bonsortaj, ol tiuj ceteraj de la toreadora kapo, ĉar ili ne suferis la punon de la barbira "gilotino". Nuntempe tiu vosto estas surmetebla; eble tufeto de maljunulino.

Mi zorgas pri tio, kion faros la toreadoroj, kiam la nunaj mallongharaj virinoj anstataŭos la longharajn maljunulinojn. El kie la toreadoroj sin provizos je vosto? Tiu afero devus esti pritraktata en la Parlamento.

Certe, kiam oni legas, ke la ventro de *Gallardo* estis nezorge esplorata de la kornoj de taŭro, oni spertas abomenon kaj pensas same, kiel *Naciao*, ke tiu spektaklo ne konvenas al civilizita popolo. Ke homo mortas, laborante en sia profesio, devus esti malpermesate.

Estas pli decaj spektakloj, kiuj alvenis al ni el la plej civilizitaj landoj: homoj, kiuj, penante piedbati balonon, piedbatas la korpon de la kamarado, lasante lin lama aŭ mortinta; junaj viroj, kiuj malsaniĝas pro tuberkulozo aŭ kormalsano kaŭzita de troa sportado; vetkura rajdisto, kiu dumgalope falas teren kaj submetas sian kapon al la kombado de aro da ĉevalkruroj; viroj enmetitaj en flugrapidaj aŭtomobiloj, kiuj elmontras, kiel oni povas pasigi la nazon kaj ĝiajn ĉirkaŭaĵojn al alia loko; viroj, kiuj per pugnobatoj kaj brakpremoj sin reciproke karesas, kiel italoj kaj etipoj; k. t. p.

Kaj la plej edifa spektaklo estas, ke miloj kaj miloj da personoj pagas altajn prezojn por elĝui tiujn civilizajn kaj progresajn sportojn.

JOSEFO ORÓS.

## Letero el Nederlando

Dum la Pasko-tagoj ni festis la 25-jaran jubileon de la Federacio de Laboristaj Esperantistoj en la regionoj de Nederlanda lingvo. Sabaton antaŭ la Pasko alvenis el la Flandraj kaj Nederlandaj urboj, urbetoj kaj vilaĝoj la partoprenantoj por kunfesti la interfratiĝan vesperon. Ja tiu interfratiĝa vespero estis granda sukceso. Pli ol 1700 geamikoj plenigis la belege ornamitan salomon de la zoologia ĝardeno en Hago. Muzikhoru jam baldaŭ gajigis la ĉeestantojn kaj en la salono regis kamaradeco kaj amikeco. Post la muziko junaj infanoj ludis teatraĵon. Por la pli maljunaj estis granda ĝojo,—kaj samtempe tre kuraĝige—aŭdi la belsonan Esperantan lingvon el la buŝoj de tiuj infanoj. En tiaj momentoj oni ne dubas pri la iama venko de nia belega mondlingvo.

Kanĥoro el Roterdamo kantis kelkajn Esperantajn kantojn kaj ree ni konstatis la progreson de Esperanto. Dum la paŭzo ni havis okazon konatiĝi kaj rekonatiĝi kun gekamaradoj. Mi renkontis multe da gekamaradoj, kiuj kunvojaĝis antaŭ preskaŭ du jaroj (kiel rapide forpasis tiu tempo!) al la Valencia kongreso. Vi bone komprenis, ĉu ne, ke ni reciproke rememorigis nin al tiuj neforgeseblaj tagoj. La salono kaj la homoj malaperis kaj denove ni travivis tiujn ravegajn tagojn en la bela Hispanujo. La tagoj pasis, sed felice la memoro restis.

Post la paŭzo ni ree aŭdis muzikon kaj kantojn kaj vidis teatraĵon. Preskaŭ estis la noktomeza horo, kiam ni kontente iris hejmen.

Dimanĉon la unuan Pasko-tagon je la 10-a matene okazis la unua kunsido. Pli ol 1300 gekamaradoj ĉeestis tiun kunsidon. Nia prezidanto malfermis la kongreson per ne longa, sed tre entuziasma parolado, en kiu li koncize pritraktis la historion de nia federacio. Li rememorigis ĝian fondon kaj ĝian nur malrapidan kreskadon en la unuaj jaroj. Tamen la lastaj tri jaroj estis por nia federacio tre prosperaj kaj nun ĝi havas pli ol 4.000 membrojn kaj estas pli granda, ol la aliaj Esperantaj unuiĝoj en Nederlando kune. Ŝajnas, ke nun la laboristoj komencas pli bone kompreni la utilon de Esperanto precipe por la laboristaro.

Estis solena momento, kiam la unua sekretario de la federacio, kiu samtempe estis unu el la fondantoj, parolis kelkajn vortojn kaj la kongreso honoris lin per longa aplaŭdo. Post salutvortoj de reprezentantoj de aliaj Esperantaj unuiĝoj ni foriris por fari ekskurson, sed antaŭe la fotografisto eternigis la kongreson per bela foto.

Vespere je la 8-a ni komencis pritrakti la agplanon. Ni kunsidis ĝis la 11-a horo. Lundo sekvintan la kunsido komenciĝis je la 10-a horo por daŭrigi la agplanon. La diskutoj okazis en plena kamaradeco kaj je la 3-a tagmeze nia prezidanto fermis ĉi tiun fruktodonan kongreson. Oni ankoraŭ decidis sekvontan jaron kongresi en la Flandra urbo Gent kaj reciproke ni promesis nin ĉeesti en tiu kongreso.

Tute kontenta ĉiu ree vojaĝis hejmen, kunportante la firman opinionon, ke, malgraŭ ke la Esperanta vojo ne estas sen dorĥoj, tamen la Esperanta ideo fine venkos.

Geamikoj restu kredantaj kaj fidelaj al tiu ideo kaj pripensu la vortojn de nia kara majstro Doktoro Zamenhof:

Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante  
Ni iru la vojon celitan.  
Eĉ guto malgranda, konstante frapante  
Traboras la monton granitan.  
L'espero, l'obstino kaj la pacienco,—  
Jen estas la signoj, per kies potenco  
Ni paŝo post paŝo post longa laboro  
Atingos la celon en gloro.

*Kamaradece Via.*

W. SLOTEGRAAF.

Hago, la 25-an de Aprilo.

## « N I A G A Z E T O »

Ĉi tiu esperanto-gazeto, eldonata en Francujo, kies formato estas 43'5 × 31'5 centimetra, konsistas el multaj paĝoj ilustritaj per belaj fotografajoj kaj estas redaktata de profesiaj gazetistoj nome: Georges Avril, S. Grenkamp-Kornfeld, Julio Baghy ktp., kies nomoj estas ja tre multe konataj en Esperantujo kaj garantiis la bonstilon kaj altan intereson de la enhavo.

La abonejo en Hispanujo por ĉi tiu tre grava, ĉiumonata gazeto estas "Aragona Esperanto-Federacio" — strato Roda 10, Zaragozo —, do ĉiuj hispanoj dezirantaj ĝin aboni faru la abonpeton pere de ĝi.

Jarabono por hispanoj: 6'45 pesetoj, sendokoste enalkalkulita.

## EL LA VERKO «VOJAĜO TRA LA VORTARO» DE CHARLES MARRÉY

Esperantigis V. Inglada.

*A. B. C.*—Komenco kaj fino de la scienco de multe da scienculoj, kiujn kredas multsciencistoj, tiuj kiuj scias nenion.

*Akparanto.* — Viro, kiu havas edzinon kaj kromvirinon kaj ne volas, ke la unua invitita sian kuzon Julion kaj malpermesas, ke la dua akceptu sian amikon Gustavon.

*Akordo.*—Malofta afero ĉe la orkestroj, ĉe la hejmomastrumado kaj ĉie, kie oni devas miksi sonojn kaj malmiksi profitojn.

*Perfekta akordo.*—Tri sonoj, kiuj kune devas fari nur unu; triunuoj, kiu estas mistero por multe de virtuojoj.

*Akordiono.*—Fajfilo, kiu faras harmonion kaj evitas melodion—tute same, kiel partiano de la estonta muziko.

*Akuŝo.*—Ago venigi en mondon junan regnanon aŭ junan regnaninon. La edzino suferadas, la edzo malesperas kaj tamen tre ofte la bonkorulo ne estas la kaŭzo de la doloro de sia edzino.

*Aktorino.* — Bona fraŭlino, kiu tre ofte estus honesta, se la tualetto ne estus tiel kara.

*Adamo.*—La unua konita Georgo Dandin.

*Adoro.*—Honorego, kiun oni faras al la Kreinto, kiam oni adoras iun kreinton.

*Plenaĝulo.*—Persono, kiu havas rajton esti prudenta, kaj kiu plej ofte ne trouzas tiun rajton.

*Koketaĵo.*—Kiam virino havanta belajn kruojn ĝuste relokas sian ŝtrumpligilon antaŭ amanto, dirante al li: ne rigardu! Kio kompreneble naskas ĉe li deziron rigardi. Tio estas koketaĵo.

*Noto.*—Kompreneble se ŝiaj kruroj ne estas bele formitaj— la ago ĵuscitita ne estas koketaĵo.

*Dua noto.*—La virino, kiu ne kredas havi belajn krurojn, ne havas ankoraŭ ŝtrimpligilojn.

*Aĝo.*—Sekreto, kiun la virinoj gardas neperforteble. Kiom da viroj estas virinoj de tiu vidpunkto!

*Agonio.*—Lasta akto de dramo.—Unua akto de mistero.

*Helpo.*—Oni ofte bezonas ĝin kaj tiam oni ne trovas. Ifoje, kiam oni havas belan edzinon venas helpo, kiun oni ne serĉis.

*Alabastro.*—Ŝtono samspeca, kiel marmoro, tre malplivalorigita de post kiam la poetoj ne plu uzas ĝin por fari la gorgon kaj la ŝultrojn de siaj heroinoj.

Laŭ decido de la komitato de "Fratego", ĉar ĝi konsideras Esperanton jam sufiĉe ellaborita lingvo tiel respektinda, kiel iu ajn alia nacia, kaj tute ne ludilo nek amuziĝo por vortelpensistoj, en NIA VIVO nur estos uzataj oficialaj vortoj. Oni tamen esceptos tiujn vortojn, kiuj temas pri *teknikaĵoj* aŭ *specialaĵoj* de iu lando *ne facile* tradukeblaj per oficialaj vortoj, tial ke por ili ankoraŭ ne estas oficialaj vortaroj.

## LIRIKA POPOLRAKONTETO

Maljunul' sur mian pordon  
Frapis.—Kiu tie restas?—  
Demandis mi.—Senresponde,  
Aŭdigis frap' pli potenca.  
Mi tiam al pord' rapidas,  
Kaj tie neniu estas,  
Nur surskribo jen diranta:  
"La temp' vokas, ne atendas!"

*El hispana lingvo tradukis,*

VICENTE INGLADA.

## «La Ruzulo de Bergen»

LEGENDO DE LA REJNO

En la tuta mezepoko la ekzekutisto estis same timata kiel malestimata, lia profesio estis konsiderata malhonesta, tio estas, malhonora.

Lia domo ne estis ĉe la aliaj, sed ie flanke, se eble, ekstere de la urbomuroj, kaj plej strange estis, ke laŭ la tiama opinio, la interrilatado kun la ekzekutisto "malhonestigis" homon alie neriproĉeblan, tio estas, malhonorigis lin tiel, ke aliaj ne plu deziris interrilati kun la malhonestiginta persono, por ne ankaŭ perdi sian burĝan honoron. Tiel okazis, ke ĉiu evitis la ekzekutiston, kvazaŭ li havus malbonan infektantan malsanon. Eĉ en la preĝejo la timato ne rajtis sidi inter la honestaj burĝoj. Li havis sian propran lokon, kiu ja troviĝis proksima de la urbregantoj kaj de la aliaj oficistoj de la urbo, sed disigata de ĉi tiuj per larĝa breĉo kaj ankaŭ pli malalta. Por neniaj festoj li estis invitata; kiu ajn ja estus dezirinta sidi kune kun la ekzekutisto aŭ eĉ premi lian manon! Tial lia vivo estis soleca kaj senĝoja, kaj grava puno minacis lin, se li riskus nekonate proksimiĝi al aliaj honestaj homoj, ĉar malhonoro minacis ankaŭ tiun, kiu interrilatis kun la ekzekutisto, eĉ ne konante lin!

Iam la potenca duko de "Jülich", "Cleve", "Berg" kaj "Ravensberg" aranĝis grandan maskofeston. Ĝi okazis en "Düsseldorf" kaj estis tre gaja. Vi ja scias, kiel la karnavalo ĉe la Rejno ankoraŭ hodiaŭ estas gaja, kaj tiel la nobelaj sinjoroj kaj la belaj sinjorinoj kaj fraŭlinoj ankaŭ tiam vagante saltis kaj petolis, dancis kune kaj ĝojis. Ili ĉiuj havis maskojn sur la vizaĝo, tiel ke neniu povis ekkoni la alian, kaj la gaja divenado, kiu eble estas ĉi tiu aŭ tiu, eĉ pligrandigis ilian ĝojon. La plej vigla el ĉiuj estis la bela dukino, preskaŭ dum la tuta vespero ŝi dancis kun juna, multkolora vestita kavaliro, kiu superis ĉiujn aliajn dancantojn pri facilmoviĝeco kaj gracia, kortega konduto. Tre volonte ŝi estus sciinta, kiu li estas, sed kvankam ŝi multe klopodis, li tamen ne malkaŝis sin kaj ankaŭ ne volis depreni sian maskon.

Nun venis la lasta danco, post kiu ĉiu devis demeti sian maskon. Vane la dukino serĉis sian kavaliro, fine ŝi trovis lin en flanko ĉambro, li ĝuste volis nerimarkite ŝtele foriri; petoleme ŝi retiris la rezistanton en la ĉambregon, dancis kun li, kaj subite fortiris lian maskon. Jen krio de teruro kaj abomeno estis aŭdebla el la homamaso. "La ekzekutisto de Bergen" oni kriis, kaj ĉiuj posteniĝis. Hontoplena la dukino kovris sian vizaĝon per la manoj. La duko alpaŝis kaj kiam oni raportis al li, kio okazis, li kolerege ordonis tuj elkonduki kaj ekzekuti la multmemulon. Sed ĉi tiu profunde klinis sin antaŭ la duko kaj parolis: "Via nobele-severa moŝto bonvolu konsideri, ke per mia malhonora morto, la hontigo de via nobela edzino ne estos forprenata de ŝi. Ĉi tio pli vere povas okazi nur per tio, ke vi ĉiel rehonestigis min kaj per tio samtempe forigos la malhonoron de la dukino".

Kun malserene sulkigitaj brovoj la duko meditis. En ĉi tiu momento, la ruza kortega amuzisto ŝteliris al la flanko de sia sinjoro kaj flustris: "Faru lin kavaliro, kaj tiel via edzino ne dancis kun malindulo!". La vizaĝo de la duko sereniĝis, li el-tiris sian glavon kaj per la plata parto de ĝia klingo tuŝis la ŝultron de la ekzekutisto, kiu estis genuinta antaŭ li. Do per tiu kavaliro mi redonas al vi la honoron", li diris, "kaj ĉar vi estas ruzulo, vi nomiĝu en estonto ruzulo de Bergen!".

La nobeloj ja kaŝe grumblis pri ĉi tiu senekzempla okazintaĵo, sed ilia kolero dronis en la gajeco de la maskofesto. Tiamaniere la ekzekutisto fariĝis kavaliro, la dukino donacis al li teron kaj servistojn kaj poste pli ofte dancis kun li.

*Tradukis*

E. SCHÜTT.

Berlin-Friedenau.

## EKSPOZICIA MATERIALO

Por propaganda, baldaŭa Ekspozicio, kiun Fratego preparas nuntempe, ni petas al la ĉiulanda esperantistaro, ke ĝi bonvolu sendi al ni ĉiuspecajn esperantaĵojn, kiel poŝtkartoj, libroj, gazetoj, afiŝoj, reklamiloj, gvidfolioj, turismaj broŝuroj, insignoj k. t. p.

Fratego pro tio restos tre danka al tiuj, kiuj tiamaniere helpas la propagandon de Esperanto en nia urbo kaj regiono.